

August Heinrich Hoffmann,  
Sopiro je l' printempo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Kiom estas fariĝinte  
Triste kaj malvarme nun!  
Krude ventas, sin kaŝinte  
Jam ne brilas plu la sun'.

Verdajn montojn surfluginte  
Valojn volus vidi mi,  
Sur herbejo ekkuŝinte  
ĝoji pri la sunradi';

Volus aŭdi mi sonadon  
Sonorilan de bovar',  
ŝalmojn kaj la birdkantadon  
Sur kampar' kaj en arbar'.

Ho, printempo, vi revenu,  
Bela, kara primaver',  
Nin per floroj, kantoj benu,  
Reornamu sin la ter'!

Restos vi al ni fidela,  
Portos ĝojon vi al ni,  
Venos vi majeste bela,  
Verdigante ĉion ĉi.<sup>3</sup>

<sup>4</sup>

...

---

<sup>3</sup>Tiu lasta linio estas iom libera aldono de la tradukinto. Ĝi ne kongruas kun la enhavo de la kvara strofo, sed eble kun la enhavo de la tuta poemo.

<sup>4</sup>Jen laŭvorta esperantigo de la kvina strofo:

*Traduko de la Germana poemo "Sehnsucht nach dem Frühling" de AUGUST HEINRICH HOFFMANN (Hoffmann von Fallersleben, \*1798-04-02 – †1874-01-19) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1997-02-01.*

*MR-291-2 / Arg-774-1552 (2013-01-17 15:50:13)*

---

Jes, vi estas restinta al ni fidela,  
Vi venos nun baldaŭ en pompo kaj belo,  
Vi alportos nun baldaŭ al ĉiuj viaj karuloj  
Kanton kaj ĝojon, muzikadon kaj dancon.